

1922-06-09-sergeant-fousek_1

Kara samideano.

Jen vin komencas prokrasti...

...kiel vi, & mi ne volas ke tiu prokrasto pli grandiĝu, mi devigas min respondi al vi. Mi ŝatus fari tion pli ofte sed en someraj monatoj en tiu urbo, estas tre malfacile skribadi longe – ĉiam oni eliras, aŭ ludas tenison, oni baniĝas, oni dancas – multaj amuzoj ekzistas dum nia sezono.

& oni devas okupiĝi ankaŭ pri mastrumado. Tempo flugas. Ekz. matene, post diversaj zorgoj hejme mi eliris kun nia servisteto & faris aĉetaĵojn. Mi eniris je la 12-a preparis tablojn, kusenojn, segegojn k. t. p. en la ĝardeno, sur la herbejo por ricevi amikojn teon preni je la 4a. Mi tagmanĝis je la 12.30, finis je la 1-a. Mi denove faris tualeton kiel ĉiam je tiu horo & ripoziĝis unu horon. Nun estas la 3-a, mi devus kudri sed atendante miajn amikojn mi skribas al vi. 6 aliaj leteroj atendas. Je la 5.30 ni iros ĉiuj tenison & ludos ĝis la 8-a. Vespermanĝos & akvumigos la ĝardenon & restos en la ĝardeno ĝis la 11-a vespere -

1922-06-09-sergeant-fousek_2

- ripozante, kudrante aŭ babiladante kun aliaj amikoj. Vi vidis ke somere ne restas multa tempo.

Feliĉe ke mi revenis el Parizo & nun mi estas tute freŝa kun 26° (ombre). En Parizo estis 35°.

Ho! Kia infero! Mi tamen ĝuis tiun belan urbon.

Mi ne komprenas ke viaj fotoj povas esti faritaj de amatoroj. Vere belaj ili estas, precipe tiu kie Eva estas sola. Ŝi similas iom al vi, ĉu ne? Grandan dankegon por ili.

Ĉu vi intencos iri al via Kongreso en Brno, la 11an de Junio? Mi supozas ke ne. Vi ne ŝajnas tiel „entuziasma“ pri Esp. kiel antaŭ la Praha Kongreso. Tout passe, tout casse, tout lasse. Vi konas tiun veran diron? Korespondanto mia (ne tre fervora) s-ro Sibrava el Znojmo intencis ĉeesti. Mi parolis al li pri vi. Mi ĉesis skribi al s-ro Berger pri demando de adreso. Li neniam respondas eĉ kiam mi sendis monon.

Mi ŝatus ke Kongreso okazu en Nŭrnberg – estus tiel pli proksime ol aliaj (Bologna, etc.). Mi ne estas tiel fervora dum tiuj varmegoj pri grandegaj vojaĝoj & krom mia ĉagreno ne renkonti mian amikon en Stockholmo

1922-06-09-sergeant-fousek_3

mi estas tute kontenta ke mi ne iros Helsinki-n. Ŝajnas ke ne multaj iros, laŭ la gazetoj...& estas kompreneble – tro malproksime & multekoste.

Ne atentu, mian treamantan manskribon, mia mano doloras post hieraŭa 2 hora tenisludo.

Estas nur la 2-a fojon en unu monato ke mi ludis & mi ne jam estas ankoraŭ alkutimata.

Mi esperas ke vi ne havos grandan havaĵ imposton. Estos terure. Mi vidis ke oni proponis tion en la Reichstag en Germanujo. Eble, tio alvenos en Francujo ankaŭ – ho've!

Walter Rimmel (fama pianisto) ludis tie ankaŭ kelkaj tagoj. Tio estis mirinda. Sed oni diras ke la plej fama, en la mondo la plej lerta estas la komponisto Maurice Ravel el Parizo. Mi vidis du verkojn liajn en la Opera en Januaro.

Ĉu, vidante tiun puran ĉielon, tiun verdaron, tiujn riĉajn kolorojn flore, tiun varman & bonan atmosferon ke iam.....baldaŭ.....frostiĝos, malvarmiĝos, pluvos. Ke ni tremas ĉirkaŭ fajro, pro malvarmo, ke je la 4-a ni eklumos?

...Ponah! Ponah! Kia teruro! Kia grizeco! Kia malĝojeco! & tamen tio okazos. Mi skribos pli ofte en vintro

1922-06-09-sergeant-fousek_4

& leteroj estas granda konsolo.

Mi vidis en Parizon filo de mia amiko en Stockholm & mi tute ne konis lin & mi devis skribi antaŭe kiel li vestiĝos k. t. p. Estis tre amuzante. Mi ofte vidis lin & unu vespere restis kun li ĝis la 12-a en le Bois de Boulogne, sidante apud lago kie estis multegaj boatoj lumigitaj. Multaj lumoj estis en la arbaro & muzikaro ludis. Estis tute belege & poezie.

Ofte mi pensas al la P.Kongreso, al Zofin, al la Moldava, al la varmegoj, montetoj kiujn ni supreniris, al ĉio. Ĉio estas ankoraŭ tute freŝa en nia menso. „Tout passe, tout lasse, tout casse“

Hieraŭ mi ricevis leteron de S-ro Legrand - Fraŭlino Shackleton, estas fratino & ne filino de la fama S. Mia kuzo en Londono bone konas ŝin & renkontis ŝin en Melbourne & en Montreal.

Nun, kara amiko, mi finos esperante, ke malgraŭ la somero, vi ne lasos min sen sciigoj dum 3 monatoj (preskaŭ) kiel laste.

Sinceroj Esp. salutojn al via Edzino & amikajn pensojn & rememorojn

Alice Sergeant